# Rusa Futurismo kaj Franca Dadaismo. Dramverkoj kaj Teatro.

ISAE-Prelego en la 83-a Universala Kongreso de Esperanto
Montpellier (FR) 1998

Nina KORĴENEVSKAIA - GOURIOU (FR)

**Futurismo itala kaj rusa**

Komence de la XX-a jarcento en multaj landoj naskiĝas novaj tendencoj kaj skoloj en ideoj kaj arto: fovismo, kubismo, ekspresiismo, futurismo, dadaismo, surrealismo kaj aliaj. Mi volas paroli pri rusa futurismo kaj franca dadaismo.

Por multaj homoj la nocio de futurismo estas ligita kun Italio. Itala futurismo aperis oficiale en 1909 ( estas publikigita la unua manifesto). Iliaj aktivecoj daŭris ĝis la komenco de la 40-aj jaroj. Sed en Rusio same estis futurismo, eĉ kvar futurismoj, kvar sendependaj grupoj, kiuj nomis sin futuristoj. La plej konataj estis Moskvaj kubofuturistoj: Majakovskij, fratoj Burljuk, Hlebnikov, Kruĉonnyh, Kamenskij kaj aliaj. Do, parolante pri rusa futurismo mi parolos pri tiu grupo.

La unua manifesto de rusaj futuristoj estis publikigita en 1912. La aktiveco de grupo daŭris ĝis 1925, poste ĉiu futuristo iris apartan vojon. Ili proklamis sian plenan sendependecon de itala futurismo. Nenio komuna krom la nomo. Sed kelkaj komunaj trajtoj estis: kaj italaj kaj rusaj futuristoj strebis renovigi literaturon kaj arton. Ambaŭ grupoj volis renovigi la lingvon. Certe, estis ankaŭ granda diferenco. Ekzemple, italoj ege ŝatis la temon de teknika progreso. Rusio estis multe malpli evoluita de teknika vidpunkto, kaj rusaj futuristoj ofte uzis arkaisman temaron, serĉis revenon al pasinteco, uzis folklorajn temojn kaj personojn. Sed tio estas aparta temo.

**Franca dadaismo**

Franca dadaismo evoluas inter 1916 kaj 1924. En 1916 en Zurich en la revuo *"Cabaret Voltaire"* aperas unuan fojon la vorto Dada. Oficiala versio rakontas, ke Tzara, Huelsenbeck kaj Arp, tri amikoj, tri samideanoj, serĉantaj renovigi la arton, decidis lanĉi novan skolon. Ili prenis vortaron, malfermis ĝin hazarde kaj trafis la vorton *"Dada"* - infana balbuto, sensignifa. Ili donis al la nova skolo la nomon Dada. Inter dadaistoj estis, krom jam menciitaj, Aragon, Eluard, Breton, Soupault, Vitrak, Ernst. Ili substrekis sian nepolitikecon. Aragon skribis: "Ne plu estu pentristoj, nek verkistoj, nek politikistoj, nek anarkistoj, nek proletaro, nek armeo, nek demokratio, nek partioj. Nenio, nenio, nenio!"[1]

Ribemont-Dessaignes proklamas: "La forto de Dada estas en la principo de totala detruo kaj neo."[2]

André Breton, un el la plej aktivaj dadaistoj kaj estonta ĉefo de surrealistoj, skribis: "Kubismo estis arta skolo, futurismo estis politika movado. Dada estas spirita stato. (...) Ĉi-tie ne plu temas pri tiuj dogmoj: moralo kaj gusto."[3]

Max Ernst helpas kompreni, kion signifas "spirita stato": "Terura kaj stulta milito forrabis kvin jarojn de nia ekzistado. (...) Miaj verkoj de tiu epoko devis ne ĉarmigi, sed hurligi!"[4]

Ĝenerale la vorto "hurli" estas ege ŝatata de dadaistoj - verŝajne ĝi la plej bone respegulas la "spiritan staton". Jen estas unu ĉapitro de "Dada Manifesto pri amo malforta kaj amo amara" de Tzara:

XVI

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| hurlas | hurlas | hurlas | hurlas | hurlas | hurlas |
| hurlas | hurlas | hurlas | hurlas | hurlas | hurlas |
| hurlas | hurlas | hurlas | hurlas | hurlas | hurlas |
| hurlas | hurlas | hurlas | hurlas | hurlas | hurlas |
| hurlas | hurlas | hurlas | hurlas | hurlas | hurlas |
| hurlas | hurlas | hurlas | hurlas | hurlas | hurlas |
| hurlas | hurlas | hurlas | hurlas | hurlas | hurlas |
| hurlas | hurlas | hurlas | hurlas | hurlas | hurlas(...) |
| kiu | sin | opinias | ankoraŭ | ege | simpatia |

Tristan Tzara"[5]

---

[1] Nadeau M., "Histoire du surréalisme, suivie de Documents surréalistes", Paris, Edition du Seuil, 1964, p.27

[2] Ribemont-Dessaignes G.," Les Greniers du Vatican", "Dada 2", Paris, Champ Libre, 1978, p.98.

[3] Breton A., "Les Pas Perdus", Paris, Gallimard, p. 64-65.

[4] "Max Ernst", Paris, 1980, p. 10.

[5] Tzara T., "Sept manifestes Dada", Paris, Pauvert, 1963, p. 74.

**La verkmetodoj**

La verkmetodoj de futuristoj kaj dadaistoj estas tute malsamaj. La ĉefoj de ambaŭ skoloj priskribis sian verkmetodon, kio permesas kompari ilin. Tzara donas konsilojn, kiamaniere krei dadaisman verkon:

"Por fari dadaisman poemon
Prenu gazeton.
Prenu tondilon.
Elektu en la gazeto artikolon samlongan kiom longa devas esti via poemo.
Distranĉu la artikolon.
Eltondu zorgeme ĉiujn vortojn formantajn la artikolon kaj metu ilin en saketon.
Skuu neforte.
Elprenu ĉiujn pecojn kaj reskribu la vortojn en la ordo de ilia apero el la sako.
Via poemo similos vin.
Kaj jen vi estas poeto originala kaj ĉarme sentema, kaj nekomprenita de vulgaraj homoj".[6]

Vladimir Majakovskij, ĉefo de rusaj futuristoj, publikigis artikolon "Kiamaniere fari versojn?", kie li prezentas sian verkmetodon:

"Kio estas bezonata por komenci poezian laboron?
- Unue. Ekzisto de iu problemo en la socio, kiun eblas solvi nur pere de poeziaĵo. Socia mendo. (...)
- Due. Necesas precize scii aŭ pli ĝuste senti la dezirojn de via klaso (...) en tiu afero, t.e. cela orientiĝo.
- Trie. Materialo. Vortoj. Konstanta pliriĉigo de via cerbodeponejo de bezonataj, esprimoplenaj, maloftaj, renovigitaj, kreitaj kaj ĉiuj aliaj vortoj.
- Kvare. Iloj. (...)
- Kvine. Metodoj kaj scioj de vortperlaboro, senfine individuaj, kiuj venas nur dum jaroj de ĉiutaga laboro (...)

[6] Tzara T., "Sept manifestes Dada", Paris, Pauvert, 1963, p. 62-63.



Ekzemple:
- Socia mendo: doni vortojn por kantoj al ruĝarmeanoj, irantaj al Petrograda fronto.
- Cela orientiĝo: bati Judeniĉ-on.
- Materialo: vortoj de soldata leksikaro.
- Ilo: krajonpeco.
- Metodo: rimita ĉastuŝka "[7]

Do, ni povas vidi la malsimilecon: se dadaistoj postulas mekanikan laboron, Majakovskij postulas engaĝitan literaturon, bazitan sur konscia kreo, talento kaj ĉiutaga laboro.

**Kion ili pensas pri teatro**

Mi opinias, ke inter du skoloj - rusaj futuristoj kaj francaj dadaistoj, - ekzistas ioma simileco, aparte en la sfero de teatro. Malsamaj en la politiko kaj estetiko, iliaj pozicioj kunproksimiĝas, kiam temas pri teatro: kaj futuristoj kaj dadaistoj opinias, ke nuntempa teatro maljuniĝis, malnoviĝis kaj ne plu taŭgas por la nuna spektanto, por la nuna epoko. - Do, ili konsentas pri tio, kion ili neas. Iliaj pozitivaj programoj denove diferenciĝas. Majakovskij parolas pri idea kaj eduka rolo de teatro: teatro devas disvastigi revoluciajn ideojn. Dadaistoj proklamas, ke la rolo de teatro estas "idiotigi la publikon". Tzara skribas: "Dada laboras ĉiuforte kreante idiotojn ĉie. Sed plenkonscie. Kaj ĝi mem iĝas pli kaj pli idioto."[8]

Ambaŭ grupoj komencas sian agadon per teatro, tamen ne per dramverkoj, sed per manifestiĝoj, literaturaj kaj teatraj vesperoj, kun multaj elementoj de spektaklo.

**Futurismaj vesperoj**

Rusaj futuristoj strebis "ŝoki burĝojn" kaj samtempe fari sian vivon teatreca. Ofte ili portis nekutimajn vestaĵojn, promenis sur stratoj kun pentritaj vizaĝoj. Ili organizis vesperojn kaj koncertojn, kiuj finiĝis kelkfoje per skandalo kaj eĉ per batalo. A.M. Ripellino priskribas futurisman vesperon en Moskvo la 13-an de oktobro

[7] Majakovskij V., "Sochinenija", Moskva, GIXL, 1965, t. 2, p. 478-479.
[8] Tzara T., "Sept manifestes Dada", Paris, Pauvert, 1963, p. 67.

1913:

"Antaŭ la dekoro pentrita de Lev Ĵegin, Kazimir Maleviĉ, Vasilij Ĉakrygin kaj David Burljuk, la poeto Kruĉonnyh balbutis iun nekompreneblan paroladon, verŝante varman teon sur la unuaj rangoj de spektantoj; poste Nikolaj Burljuk legis la verkon de sia frato David (forestanta): "Melkistoj de lacegaj bufoj", poste Majakovskij faris prelegon kun titolo "Ganto": ses fingroj de tiu "ganto" prezentis (...) la temojn, kiuj interesis lin en tiu momento:
1)Gusto de tago kaj levilo de parollingvo.
2)Urbobildoj en okuloj de lingvokreantoj.
3)Lulkanto per orkestro de akvokondukaj tuboj.
4)Egiptanoj kaj Grekoj karesantaj nigrajn sekigitajn katojn.
5)Grasfaldoj en foteloj.
6)Multkoloraj pecoj de niaj animoj."[9]

En 1913-1914 Burljuk, Kamenskij kaj Majakovskij faris longan konferencvojaĝon tra Rusio. Dum vojaĝo ili uzis futurismajn metodojn: "Burljuk ekzemple, krom orumita nazo, frambokoloraj vestaĵoj, pudrita vizaĝo kaj virinaj okulvitroj portis sur sia frunto la subskribon: "Mi estas Burljuk". Ĉiuj tri havis rafanetojn anstataŭ butonoj. Infanoj kriis: "Ĉu ili estas Usonanoj?"[10]

**Dadaismaj vesperoj**

Kiam post kelkaj jaroj aperis dadaismo, dadaistoj organizis vesperojn kaj manifestiĝojn ege similajn je futurismaj. Tzara priskribas la unuan dadaisman vesperon en Zurich en 1916:

"(...) Bokso rekomenciĝas: Kubisma danco de Janco, ĉiu havas sian grandan keston sur la kapo, bruoj, negra muziko (Trabatgea bonooooooooo), 5 literaturaj eksperimentoj: Tzara en frako klarigas antaŭ la kurteno, sed sobra por bestoj, la novan estetikon: gimnastikpoemo, brupoemo, vokalkoncerto, statikpoemo kemia aranĝo de nocioj, Biribum biribum saust der Ochs im Kreis herum (Huelsenbeck), vokalpoemo aaô, ieo, aiï, nova prezento subjektiva frenezo de arteroj la danco de koro sur incendioj kaj akrobatado de spektantoj. Denove krioj, granda kesto, piano kaj kanonoj

[9] Ripellino A., "Maïakovski et le théâtre russe d'avant-garde", Paris, L'Arche, 1965, p. 24.
[10] "Futurisme — 2", revuo "Europe", n° 552, aprilo 1975, p. 49.



senpovaj, oni disŝiras kartonajn kostumojn publiko Ĉetas sin en la febro puerperala rrrrrompi. Gazetaro malkontentas poemo samtempa je 4 voĉoj + samtempa je 300 plenaj idiotoj".[11]

La tuta grupo partoprenis tiujn vesperojn. Por altiri la publikon ili uzis ĉiujn eblajn metodojn, ekzemple, foje ili anoncis la partoprenon de Charlie Chaplin...

Maurice Nadeau en sia libro "Historio de surrealismo" priskribas, kiamaniere estis organizita ekspozicio de kungluaĵoj *(collages)* de Max Ernst:

"La scenejo estis en la kavo kaj ĉiuj lumoj estis estingitaj en la magazeno; el la ŝtupara truo aŭdiĝis ĝemoj. Alia ŝerculo, kaŝinta malantaŭ la ŝranko, insultadis ĉeestantojn. (...) André Breton krake kasadis alumetojn, Ribemont-Dessaignes kriis ĉiuminute: "Pluvas sur kranion!", Aragon miaŭlis, (...) Péret et Charchoune manpremsalutis unu la alian senĉese. Sur sojlo Jacques Rigault kalkulis laŭtvoĉe aŭtomobilojn kaj perlojn de vizitantinoj..."[12]

Dum ĉiu vespero aŭ spektaklo dadaistoj legis Dada-manifestojn. La manifestoj estis insultoplenaj, ili rekte atakis la publikon. Unu el plej moderaj insultoj: "Vi ĉiuj estas idiotoj."

Kion celis tiuj spektakloj? Ĉu nur skandalon? Ofte jes. Sed la rezultoj estis pli signifaj. Dadaistoj sukcesis ŝoki la publikon, devigis ĝin partopreni la spektaklojn, la spektaklo translokiĝis de scenejo en salonon. Ribemont-Dessaignes skribis: "Teatro ne estas celo. Ĝi estas ilo de kolektiva emancipiĝo, de kultura revolucio".[13]

**Dramverkoj. Majakovskij, "Mistero-Buffo"**

Rusaj futuristoj verkis multajn teatraĵojn. Velimir Hlebnikov verkis dekon da teatraĵoj, inter ili estas fabela "Sneĵimoĉka" ("Neĝulineto") kaj filozofi-lingvistika dramo ("superpoemo") "Zangezi". La plej granda dramverkisto inter futuristoj estis Vladimir Majakovskij, kiu kreis kvar grandaj teatraĵoj. En 1913 li kreis sian unuan dramverkon "Vladimir Majakovskij. Tragedio", kies temo estas moderna urbo, poeto kaj homamaso, poezio kaj

[11] Tzara T., "Œuvres complètes", Paris, Flammarion, 1975, t. 1, pp. 562-563.
[12] Nadeau M.," Histoire du surréalisme", Paris, Edition du Seuil, 1964, p. 27.
[13] Béhar H, "Le Théâtre Dada et surréaliste", Paris, Gallimard, 1979, p. 32.

prozo, malamikeco inter homo kaj aĵoj... Post la oktobra revolucio 1917 Majakovskij verkas la teatraĵon "Mistero-Buffo", en la 20-aj jaroj li publikigas ankoraŭ "Cimon" kaj "Banejon," — verkoj, kiuj estis ofte surscenigataj kaj vivas ĝis nun.

La unua varianto de "Mistero-Buffo" estis verkita en 1918, la dua en 1920. Majakovskij akceptis la revolucion de 1917 tuj kaj sen hezito. Liaj verkoj estas revoluciaj kaj propagandas revoluciajn ideojn. Li klarigas la titolon de sia verko: "Mistero estas tio, kio grandas kaj patosoplenas en nia revolucio. Buffo - tio, kio ridindas en ĝi. "La Mistero-Buffo" estas homamasa movado, klasa kunpuŝiĝo, idea lukto, - miniaturo de universo inter muroj de cirko."[14] La teatraĵo havas subtitolon: "Heroa, eposa kaj satireca bildo de nia epoko". Majakovskij strebis montri la tutan vojon de revolucio, sed en konvencia formo: la spektaklo komenciĝas per inundo. Du grupetoj de saviĝintaj homoj ("puraj" kaj "malpuraj") konstruas floson kaj navigas, serĉante la teron. Puraj volas ĉiam laborigi malpurajn; finfine malpuraj ribelas kaj ĵetas purajn en la akvon. Sed same malpuraj riskas morti pro malsato. En plej kriza momento Iu marŝas al ili sur ondoj kaj vokas ilin ne serĉi Araraton, sed konstrui sian propran surteran paradizon. Ili alvenas al Infero, venkas diablojn; poste al Paradizo, kiu tute ne kontentigas ilin; ili trairas la landon de ruinoj kaj finfine atingas la Teron Promesitan - urbon de estonto, kie ili estos mastroj kaj laboros por ĉies feliĉo.

La teatraĵo estis arde kritikata de ĉiuj flankoj: la kritiko ne povis akcepti, ke revoluciaj ideoj estis prezentataj en la formo de religia dramo, mezepoka mistero. Vere, la verko enhavas multajn elementojn de biblia historio. Pro tio iuj kritikistoj opiniis, ke biblia formo insultas revoluciajn ideojn; aliaj opiniis, ke revoluciaj ideoj insultas biblian formon; profesiaj aktoroj rifuzis ludi rolojn en tiu "herezaĵo"; Majakovskij ne povis trovi teatron por prezenti sian verkon. Finfine ĝi estis prezentita en malnova cirko pere de amatoroj; post la tria spektaklo la administracio forprenis la cirkon...

La verko estis ege noviganta kaj nekutima por tiu epoko, kiam ĉie en teatroj regis realismo aŭ naturalismo, la teatraĵoj baziĝis sur

---
[14] Majakovskij V., "Polnoje sobranie sochinenij", t.2, Moskva, GIXL, str.359.



karakteroj kaj psikologio. En tiu verko estas nek karakteroj nek psikologio. Agas ne apartaj homoj, sed grupoj. Rolantoj eĉ ne havas nomojn: ili nomiĝas "laboristo, soldato, servistino; rusa komercisto, hindia radjao, pastro, ktp. Ili ne havas personecon, ili nur prezentas sian klason, socian tavolon. Same la tuta historiko, sinsekvo de eventoj, lukto, finalo.

**Tzara. "Unua ĉielaventuro de sinjoro Antipirino"**

Dadaistoj iris multe pli malproksimen laŭ la vojo de detruo kaj renovigo. Ili same verkis por teatro. Plej fama verko estis la teatraĵo de Apollinaire "Mamoj de Tirezias" Aragon verkis "Spegulŝrankon dum unu ĉarma vespero", Vitrak eldonis entute kvar volumojn da teatraĵoj, kelkaj el ili povas esti konsiderataj kiel dadaismaj. Sed mi opinias, ke la plej dadaismaj verkoj estas kelkaj teatraĵoj de Tzara, aparte "La unua ĉiela aventuro de sinjoro Antipirino", (poste li verkis "La duan ĉielan aventuron de sinjoro Antipirino". Ambaŭ verkoj similas unu la alian kaj estas tre malfacile kompreneblaj.) Rolantoj nomiĝas Sinjoro Krikri, Sinjoro Bumbum, Sinjoro Antipirino, Graveda virino, Direktoro, Pipi, ktp, kaj en la fino de la listo - "Tristan Tzara en sia propra rolo". Jen estas fragmento de la teatraĵo:

*S-ro Krikri:*
domo fluto uzino kapo razita
107 kiam la nokto venis trankvile kiel skarabo
kunikloj ĉirkaŭis la katedralon dralon dralon
kaj turniĝis ĝis kiam ĝi iĝas lumo $H_2O$
kvazaŭ nordaj partoj kiuj volviĝas en Ndjaro
*Direktoro:*
Li mortis dirante, ke la farso estas poezia elemento same kiel doloro ekzemple - poste ili kantis
*S-ro Krikri, graveda virino, Pipi, s-ro Antipirino:*
Krokrokrokrokrokrodril
krokrokrokrokrokrokrodrel
krokrokrokrokrokrokrokrodrol
krokrokrokrokrokrokrokrokrodral"[15]

---
[15] Tzara T., "Œuvres complètes", t. 1, Paris, Flammarion, 1975, p. 79.

La kulmino de tiu teatraĵo estas monologo de Tzara:

"Dada estas nia intenseco; kiu konstruas bastonetojn sen postsekvoj la kapo sumatrala de germana ido; Dada estas arto sen pantofloj ni paraleloj; kiu estas kontraŭ kaj por la unuiĝo kaj certe kontraŭ la estonto (...). Nepra neceso sen disciplino ni moralo kaj ni kraĉas sur la homaron ..."[16]

Estas sufiĉe facile rekoni en tiu monologo "La Unuan Manifeston Dada". Tzara opiniis, ke ĉiujn manifestojn necesas legi laŭtvoĉe antaŭ la publiko, li verkis ilin por tio. La manifesto bone enskribiĝas en la teatraĵon.

Kio do restas de tradicia teatro en tiu ĉi dadaisma verko? - Preskaŭ nenio. Nur ĉeesto de rolantoj kaj publiko kaj dispartigo de teksto en replikoj. De tiu vidpunkto Tzara estas pli radikala, ol rusaj futuristoj.

**Kelkaj konkludoj**

Dadaistoj kaj futuristoj ne imitas unu la alian. Ĝis nun mi ne trovis menciojn pri iliaj kontaktoj en tiu epoko. Iliaj kontaktoj komenciĝas pli malfrue, en la fino de la 20-aj jaroj, kiam la aktiveco de ambaŭ grupoj jam finiĝis. Do, plej verŝajne temas pri tio, ke la ideoj de artrenovigo evoluis samdirekte en Francio kaj en Rusio. Rusa futurismo kaj franca dadaismo estas du malsamaj fenomenoj, du malsamaj skoloj, kiuj naskiĝis en la sama epoko kaj ambaŭ naskiĝis el protesto kaj neo: protesto kontraŭ la milito, kontraŭ la socio, kontraŭ la kulturo kaj arto de tiu epoko. Sed dadaistoj volis nur protesti kaj detrui, fari *"tabula raza"*, - kaj futuristoj volis detrui por konstrui novan mondon kaj novan arton.

Adreso de la aŭtorino:
D-ino Nina KORĴENEVSKAIA-GOURIOU
L'Espiguette, Bat. C, Rue de Verdun
FR 13140 MIRAMAS
FRANCIO

---

[16] Same, p. 81.



## Ortografio Internacia

ISAE-Prelego en la 83-a Universala Kongreso de Esperanto
Montpellier (FR) 1998

André ALBAULT (FR)

Redakcia informo: la enhavo de tiu prelego konformas lau enhavo kaj tendenco tiomgrade al la artikolo de s-ro Y. Gicquel en Sci. Rev. 48 (1997)(3) kun la titolo 'Eventualaj Reformoj de la Skribo de Esperanto', ke ni rezignas pri la represado.

[La titolo de la prelego de s-ro A. Albault nur hazarde similas al la artikolo de s-ro A. Minell en Sci. Rev. 49 (1998)(2)].

Tamen, ni reproduktas, kiel suplemento al la artikolo de s-ro Gicquel, la tabelon "Modifita Help-Alfabeto", kiu bone reprezentas kaj koncize resumas ambau tiurilatajn kontribuojn pri la temo.

Samtempe ni volas atentigi pri la libro

**"Panoramo de la Universala Skribo"**
Jon Walter Yung
Eldonantoj: Yannic Gicquel kaj Christian Pradelet
FR 31017 Toulouse B.P. 2032

Tiu libro (336 p.) estas recenzita en MONATO, 18, (1997)(1) p. 20 kaj ricevebla ĉe la libroservo de UEA (39 NLG); ĝi enhavas, en 8 ĉapitroj, interesajn detalojn pri fonetikaj sistemoj, specife pri la Internacia Fonetika Alfabeto (IFA, evoluita inter 1886 ĝis 1900), alfabeta tipologio, universala alfabeto, digramaj grafismoj, transliterigoj, Universala Ortografio, *Unicode (ASCII)*, kaj tiurilatan esperanto-bibliografion. La teksto konsideras la historian evoluon kaj estas skribita lau la Universala Ortografio, kiun legi ne faras problemon.

Sekvas nun sen plua komento la menciita 'Helptabelo', kiu bone prezentas eblan evoluon kaj kiu parolas per si mem.